



LA JUNA VIVO

MONATA BAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Ĝiro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

REZOLUCIO DE UNESKO PRI ESPERANTO.

Bonegaj rezultatoj atingitaj.

Kiel niaj gelegantoj verŝajne memoras, oni transdonis la 2an de aŭgusto 1950a al Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success (Usono) la konatan petskribon de U.E.A. Post kelkaj tagoj la Sekretariaro de UNO transdonis la Petskribon al la sekretariaro de UNESKO en Parizo. Pro la formo, laŭ kiu la Petskribo estis sendita de unu Sekretariaro al la alia, ekestis duboj koncerne la demandon, ĉu fakte UNESKO estas ŝargita pri la afero aŭ ne. Tiujn dubojn fine plene rompis la Rezolucio, akceptita dum la 7a Kunveno de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo, okazinta en nov. kaj dec. 1952a.

La signifo de la Rezolucio, kiun vi trovas apude, estas koncizigitaj en la ĉisubaj punktoj:

1. ni faris tre seriozan informan laboron, ne nur en UNESKO mem, sed ankaŭ en larĝaj popoltavoloj. Ni pruvis klare ke ni estas vere grava faktoro en la internacia vivo;
2. per si mem la Rezolucio signifas:
 - a. ke al U.E.A. povas esti havi-

LA REZOLUCIO.

Je la 10a de decembro 1952a la Ĝenerala Konferenco de UNESKO akceptis jenan rezolucion:

„La Ĝenerala Direktoro estas rajtigita komuniki al Membro-Ŝtatoj la Internacian Petskribon favore al Esperanto, kiu estas prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj kaj transsendita de tiu Organizaĵo al UNESKO kaj entrepreni, konforme al komentoj ricevita, la necesan preparlaboron por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi dum ĝia Oka Kunveno, pri la agoj farotaj je ĉi tiu Petskribo“.

gata la jura pozicio de konsulta asocio ĉe UNESKO.

- b. ke ĉiuj ŝtatoj-membroj objektivite estos informitaj pri la Petskribo kaj pri kelkaj gravaj detaloj rilatantaj al ĝi.

(daŭrigo sur la 2a kaj 3a paĝoj)

PARENTEZE.

Paco en la Mondo.

Vi kaj mi, ni scias, ke ĉiu homo havas siajn specialajn ecojn. Estas ekzemple la krimuloj, drinkuloj, bonuloj (kelkaj), surduloj kaj mutuloj.

Ankaŭ mi citu la optimistojn kaj pesimistojn, ĉar pri ili mi volas diri ion.

Unue la optimistoj. Ili facilanime parolas:

„Ĉu paco en la mondo?“ Nu, ankoraŭ ne estas, sed sendube ĝi baldaŭ venos!

Ni homoj, plej prudentaj estaĵoj, ja atingas ĉion, kion ni volas atingi. Kiel ni estas evoluantaj ek de la tempo ke Evo kaj Adamo enamiĝis! Pensu pri veturiloj, ŝipoj, aviadiloj, pri presarto, fotografado, pensu pri gaso kaj elektro, pri interplaneda trafiko kaj kernispartigo, gramofono kaj televido, pri Doris Day —, ho, mi povus plenskribi tutan jar-kolekton de *La Juna Vivo*, — eĉ plurajn!

Ja nia tekniko pluenrapidas al perfektigo.

„Ĉu paco en la mondo?“ Atendu karuloj, iun benitan tagon ni ankaŭ fabrikos tion!!

La pesimistoj ĉagrenas. Pri paco en la mondo ili grumbblas: Ah utopio! El ĉio, iam penkreita, ni homoj estas la plej mizera rezultato! Senĉese ni malamas, insultas kaj batalas. Pli kaj pli detruaj niaj militoj fariĝas. Tio daŭrados, kedu nin, eĉ kiam fine nur unu homoparo loĝas sur la tero. Ne revenos tiam la tempo dum kiu Evo kaj Adamo amekaresos unu la alian, ne, tute ne, eĉ tiam iras li (aŭ ĉu ŝi?) al la fronto, kiu loĝas sur la norda hemisfero. Li postulas ĉiam pli da potenco kaj envias al la alia la sudon. Tiam, vi kedu nin, la duono de la lasta homoparo, subite transiras la ekvatoron kaj terurega finbatalo venos. La venkanto restas — sola — sur la tero, kaj tiam tamen plenumiĝos la deziro: „Paco en la Mondo“



(daŭrigo de la 1a paĝo)

- c. ke en la sekvantaj 2 jaroj nia afero estos pritraktata en la Sekretariaro de UNESKO kiel **tute speciala demando**, en la kadro de ĝiaj normalaj aktivecoj.
- ĉ. ke la Sekretariaro de UNESKO raportos objektivite pri Esperanto al la sekvanta Ĝenerala Konferenco, kiu okazos en 1954a en Montevideo.
- d. ke, se iam UNESKO pritraktos la ĝeneralan problemon de lingvoj en internaciaj rilatoj, ni devos esti vokitaj al kunlaboro.

Por tia bonega sukceso U.E.A. ŝuldas sian dankon al la bonega laboro de 11 landaj asocioj, kiuj koncentrigis siajn fortojn kun la celodoni al la naciaj UNESKO-komisionoj kaj naciaj UNESKO-delegacioj ĉiujn necesajn informojn pri Esperanto; pro la preparo de aparta dokumento de Centro de Esplorado kaj Dokumentado de U.E.A., en kiu koncize estas skizita ĉiuj atingiĝoj de Esperanto en ĝia 65-jara ekzistado: pro la arango de debatvespero en Esperanto por la delegitoj de la konferenco, kiu lasis al ili profundan impreson. Al la konferenco estis al-

LA EVOLUO DE ESPERANTO KAJ LA AKADEMIO.

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto.

La Akademio de Esperanto oficialigis la sufikson *-end-* kun la difino: „kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata -i“. Estonte do ne plu estos neologismaj frazoj kiaj „la tasko estas fareda“, „la regulo estas forigenda“ aŭ „la libro estas legenda“. (Atentu tamen! La lasta frazo estas dubesenca).

La decido pri la nova sufikso altiras atenton al la rolo, kiun la Akademio ludas en la evoluo kaj progreso de Esperanto. Oni ofte aŭdas la kritikon, ke ĝi „funkcias malbone“, ke ĝi „ne estas sufiĉe aktiva“ kaj ke ĝi „estas tro konservativa“.

En la voĉdono pri *-end-* partoprenis 40 Akademianoj. 22 voĉdonis por la oficialigo kun la proponita difino; du voĉdonis por la oficialigo, sed ne akceptis la difinon; 16 voĉdonis kontraŭ la oficialigo. La tri usonaj Akademianoj „disfalis“ en tri grupojn; S-ro Scherer voĉdonis „jes“, D-ro Lippmann akceptis la oficialigon, sed ne la difinon, kaj mi voĉdonis „ne“.

La kaŭzo de mia ago ne estis principa kontraŭstaro kontraŭ *-end-*, sed la opinio, ke plua studado de la problemo estas dezirinda kaj ke la afero ne estas urĝa. Kompreneble mi nun volonte akceptas la decidon de la plimulto.

Dum la 47 jaroj de la ekzisto de niaj lingvaj institucioj, la Lingva Komitato kaj Akademio (nun nur plu ekzistas la Akademio) oficialigis nur unu prefikson kaj tri sufiksojn: *-a3-* en 1910, *-ism-* en 1914, *-mis-* en 1929, *-end-* en 1952. Krome la Lingva Komitato akceptis 6 Aldonojn al la Oficiala Vortaro, oficialigante proksimume 1500 radikojn. Ĉar la Oficiala Vortaro enhavas proksimume 2800 radikojn, la tuta nombro de oficialaj radikoj en Esperanto nun estas proksimume 4300.

Multaj Esperantistoj riproĉas al la Akademio, ke ĝi „ne multe faras“, ke ĝi oficialigas radikojn „tro malfrue“ kaj ke ĝi „ne zorgas pri la pliriĉigado de la lingvo“. Ili atentigas, ke la lingvo daŭre kreskas per la apero de novaj vortoj en libroj kaj gazetoj, kaj diras, ke la Akademio devus rapide sankcii aŭ malpermesi ilian uzadon.

Oni povas respondi, ke en la nuna tempo estas preferinde, ke la Akademio faru tro malmulte, ol ke ĝi faru tro multe, ĉar stabileco estas pli grava ol daŭra kreskado. Kelkaj Esperantistoj emas troigi la „enpenetron de neologismoj en praktikan uzon“. Se unu aŭ du verkistoj uzas neologismon en siaj libroj aŭ se du aŭ tri gazetoj uzadas ĝin, tio tute ne sufiĉas por pruvi ĝian ekzistraj-

lasataj 2 oficialaj observantoj de U.E.A., s-ro Durrant kaj prof. Lapenna, kiuj multe kontribuis al la fina sukceso.

Fine ni volas citi la vortojn de prof. Lapenna, fine de lia artikolo en „*Esperanto*“, el kiu ni ĉerpis ankaŭ la aliajn faktojn:

„Al mi persone la Konferenco ankoraŭfoje klare montris kiom grandega, potenca kaj nobla estas la afero por kiu ni luktas. Ni portu kun

fiero nian kvinpintan verdan stelon kaj tenu alte nian kapon, ĉar nia celo estas pli ol justa kaj niaj vojoj estas ĝustaj. Ni devas sendube ankoraŭ multe batali kontraŭ ĉiaspecajn antaŭjuĝojn, nescion, ignoradon. Sed ni povas esti konvinkitaj pli ol iam, ke tute certe venos la tempo, kiam la estontaj generacioj estos dankemaj al ni pro la laboro, kiun ni nun faras por ili“.

ton. Eĉ se preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj akceptus iun radikon, oni ankoraŭ povus esti hezitema.

Laŭ bone konata diro de Edmond Privat, Esperanto estas „vivanta lingvo de vivanta popolo“. Tio estas vera — sed ne tute, Esperanto estas vivanta lingvo por kelkaj homoj, dormanta aŭ duone dormanta lingvo por aliaj. Permesu al mi klarigi tion.

Nur malgranda parto de la personoj, kiuj lernis Esperanton, uzas la lingvon konstante. Esperantistoj, kiuj uzas Esperanton ĉiutage, abonas pri ol unu Esperanto-gazeton, aĉetas kaj regule legas la plej gravajn nove aperantajn librojn, ne estas multnombraj. Ni diru, ke tiu kategorio konsistas el 10,000 personoj.

Pli multnombraj estas tiuj, kiuj iom partoprenas en la organizita Esperanto-movado, legas amenaŭ unu Esperanto-gazeton regule kaj Esperanto-librojn de tempo al tempo. Ni supozu, ke ilia nombro estas 50,000.

Tria kategorio konsistas el tiuj, kiuj ne estas membroj de iu asocio aŭ klubo kaj ne abonas Esperanto-gazeton, sed uzas Esperanton okaze, kiam tio ŝajnas al ili utila. Ili havas en siaj libroŝrankoj lernolibrojn kaj aliajn Esperanto-librojn. Ili tamen malfermas ilin tre malofte. La nombro de tiuj „dormantaj“ aŭ „duon-dormantaj“ Esperantistoj estas granda, eble duon-miliono. Oni povas bedaŭri, ke ili ne estas aktivaj, sed oni ne povas nei, ke ili ekzistas kaj formas pasivan, sed ne tute senvaloran rezervan armeon.

Fine ekzistas tiuj personoj, milioj da ili, eble multaj milionoj, kiuj iam lernis aŭ komencis lerni Esperanton, sed perdis intereson kaj forgesis preskaŭ ĉion. Nur en esceptaj cirkonstancoj Esperanto estos utila al ili. Se iu el ili retrovas sian intereson pri la lingvo kaj movado, la k'opodo, kiun li devas fari por lerni Esperanton, tamen estos malpli granda ol la k'opodo de persono, kiu komencas la studon sen antaŭa scio.

Ekzamenante la problemon de neologismoj de la vidpunkto de tiuj kvar kategorioj, ni vidas, ke nur la

anoj de la unua kategorio regule havas kontakton kun novaj radikoj enkondukataj en la lingvon kaj povas permesi al si iomele kompetentan jugon pri ilia dezirindeco aŭ ne-dezirindeco. Nur parto de la dua kategorio estas en la sama situacio. Personoj, kiuj legas „Brazilan Esperantiston“ aŭ „Francan Esperantiston“, sed neniam alian Esperanto-gazeton, scias nenion pri lingvaj studoj en „Esperanto“ de OEA aŭ pri neologismoj uzataj en „Hero-do“. Anoj de la tria kategorio eble nur rememoras tion, kion ili lernis en lernolibro publikigita en 1912. Ili neniam aŭdis pri la prefikso *mis-*, la surkso *-end-* aŭ vortoj kiaj *varo*, *grego* kaj *mundi*. Esperanto estas por ili simila al la latina lingvo, kiun kelkaj el ili iam studis, sed ne al la gepatra lingvo, kiun ili parolas ĉiutage.

Se ni sukcesos multe pligrandigi ne nur la nombron de tiuj, kiuj lernas Esperanton, sed eĉ pli la nombron de la konstantaj uzantoj, la situacio aliĝos. Kiam gravaj komercaj firmoj, sciencaj organizoj, internaciaj kongresoj ktp. grandskale uzos Esperanton, kiam la scio de la lingvo prezentos pli grandan praktikan, eĉ finanĉan profiton, tiam Esperanto rapide iariĝos vivanta lingvo de centmiloj da personoj. Tiam farigos neceso, ke la Akademio laboru pli multe kaj pli rapide, ke ĝi oficialigu novajn vortojn, pretiksojn kaj sufiksojn por kontentigi konstante ŝanĝigantajn bezonojn kaj ke ĝi starigu erikan kaj kompetentan organizon por gvidi kaj observi projektojn pri fakaj vortaroj.

Ĝis tiu tempo, laŭ mia opinio, la Akademio devos resti precipe garantianta kaj defendanta de la Fundamento. Ĝi oficialigos nur tiujn radikojn, kiuj estas nepre necesaj por esprimi novajn aspektojn de la moderna vivo, kaj ĝi daŭre admonos la neologismemulojn, ke ili uzu sian energion kaj sian talenton por pliperfektigi en la Zamenhofa Esperanto, anstataŭ proponi fantazie elpensitajn novajn radikojn „nepre akceptendajn“.

(El „American Esperanto Magazine“ Juli-Aŭg. nro.)



9^a kongreso en Wörgl

WÖRGL KAJ ĜIA ĈIRKAŬAJO.

La urbo Wörgl, la ideala bazo por la vizitanto de l'tirola Malsupra-Innvalo, estas belege situita loko kun iom pli ol 6000 enloĝantoj, centro de fervoj- kaj aŭtobuslinioj Innsbruck-Kufstein-Kitzbühel, rapidtrajna stacio de la linioj Berlin-Rom kaj Wien-Basel (Paris).

Pro siaj ventotrankvila situo, sana klimato kaj pro la ĉirkaŭaj proksimaj arbaroj la regiono estas precipe taŭga kiel somera restadejo, klimata kuracloko kaj turista stacio.

Multnombraj ekskursvojoj al la plej proksima aŭ pli fora ĉirkaŭaĵo malfermas al la migranto multe da pejzaĝaj belaĵoj. Ĉu traarbara promonado, ĉu suralpa aŭ surmonta migrado, ĉu vizito al la montlagoj aŭ la vojo al historiaj lokoj, ĉiam sin trovas perloj de naturbelaĵoj, konstruaĵoj kaj originalaj popolkutimoj.

Aŭtobusveturoj tra la vilaĝoj Söll, Ellmau, St. Johann, Küssen, Walchensee, Kufstein — do ĉirkaŭ la Kaisermonaron — kaj al Rattenberg (ege



pitoreska, malnova urbeto), Brandenberg, Alpbach, Jenbach, Achensee (-lago) kaj Zillertal (Ciler-valo), ja eĉ tuttagaj ekskursoj al sur Großglockner k.t.p. estas facile arangeblaj ekde Wörgl, kie troviĝas vigla trafikoficejo. Speciale menciinda estas la trafiko kun la samlima (najbara) altvalo Wildschönau (1100 m s.m.) kun la vilaĝoj Niederau, Oberau, Auffach kaj Thierbach, de kie oni supreniras al sur Markbachjoch (1400 m) kaj Roßkopf (1800 m). El Niederau kondukas tutjare funkcianta seĝolifto sur la supron de Markbachjoch, tre ideala alpa regiono kun belega perspektivo — dum la vintro ĝi estas skiparadizo kun multaj bonegaj kaj lavangliberaj deklivoj. En Wörgl estas je dispono bonega skitereno kaj skisaltejo (atingebla distanco: 80 m).

Dum somero oni havas eblecon por bani sin en la ŝlimbordbanejo de la najbara loko Kirchbichl, atingebla post 45 minutoj. En Wörgl mem es-

tas naĝbanejo kaj radiumoza mineralbanejo „Eisenstein”.

La gastejoj grandparte estas modernaj ekipitaj, sed ĉiuj portas la stampon de burĝa komforteco. La plej multaj el ili havas belajn manĝosalonojn, verandojn kaj gastejardenojn. La manĝaĵoj estas bonegaj, la prezoj ne tre altaj. Tuta enloĝantaro estas tre afabla kontraŭ fremdaj gastoj kaj tre helpopreta. Ne mankas eblecoj por distrado, speciale por tiuj, al kiuj plaĉas la hejmaj, tirolaj popolkutimoj.

Gg. Opperer.

Ni bedaŭras, ke ni ankoraŭ ne povas al vi sciigi la prezojn ktp. Ŝparu jam nun kaj estu pacienca — ĝis la marta nro. Tiam vi aŭdos pli. Ni intense konferencas, ke la prezo estu kiom eble plej malalta.

Konservu vian libertempon kaj vian monon por la IJK en Wörgl.

La Estraro.

LA VOJAĜSERVO.

Karaj Geamikoj!

La malagrabra vintra vetero ankoraŭ daŭras kaj dum libera horo vi eble jam meditis pri via nunjara ferio. Espereble la bona rememoro pri niaj TEJO-kongresoj instigos vin ankaŭ en tiu ĉi jaro partopreni ĝin. Aŭ se vi devas libertempi antaŭe aŭ poste, vi kompreneble ne volas resti hejme, sed praktike uzi vian scion de Esperanto. Ĉu vi ne revas pri vizito al alilandaj samideanoj kaj fremdaj landoj?

Vi mem ja scias, ke por junulo, kiu bicikle, aŭ aŭtohaltige vagas „tra la mondo” ne estas facile trovi mal- karan tranoktejon. Hoteloj estas

postulemaj kaj en junulargastejoj vi eble ne trovos kontakton kun samaĝuloj pro la lingvobaro.

Kaj jen ni atingis punkton, kie la Vojaĝservo de TEJO volas helpi. Ĝi kolektas la adresojn de TEJO-anoj, kiuj estas pretaj gastigi aliajn TEJO-anojn. Se vi do intencas vojaĝi alilanden, vi sendos al la Vojaĝservo de TEJO detalan priskribon pri via vojo kaj pri preferataj tranoktlokoj. Se troviĝas en tiuj lokoj TEJO-anoj gastamaj, vi ricevos iliajn adresojn por ke vi povu letere kontakti kun ili kaj ekscii detalojn.

Krom tio la Vojaĝservo laŭpove provizos vin per prospektoj Esperantlingvaj pri la vizitota lando kaj

per informoj pri necesaj dokumentoj, vizioj, kurzoj, vojaĝeblecoj, k.s.

Karaj Geamikoj! Vi certe jam rimarkis, ke la Vojaĝservo estas ĉefe memhelpo. Se vi do volas vojaĝi kaj trovi dormejon, ankaŭ vi laŭpove ebligu al aliaj la samon. Se vi do havas la bonŝancon povi gastigi samideanon, bonvolu fari la jenon:

Sciigu al la Vojaĝservo

1. viajn nomon kaj adreson,
2. kiom da personoj samtempe povas gastloĝi ĉe vi,
3. se gravas por vi: preferataj sekso, aĝo kaj religio de la gasto,

4. la maksimuma daŭro de gastloĝado.

Se vi deziras respondon de ni, aldonu 1 internacian respondkuponon, se temas pri loĝado ĉe samideano, aldonu 2.

Geamikoj, pripensu, ke vi ne nur havos elspezojn kaj laboron, sed ke la interkonatiĝo kun alilandaj samideanoj rekompencos vin per neforgeseblaj horoj.

La Vojaĝservo dankas vin jam nun pro via baldaŭa respondo.

VOJAĜ-SERVO de TEJO,

p.a. Kurt Meyer,

BREMEN, Parkstr. 99. Germanujo.

AMERIKAJ GEJUNULOJ.

Ke internaciaj renkontiĝoj kaj vizitoj necesas por internacia kompreniĝo, ne estas mia inventaĵo. Sed neniam mi spertis la verecon de tiu diraĵo pli ol vizitante Usonon (USA) dum duona jaro kaj vivante kune kun Amerikaj gejunuloj.

Estante en Usono mi iam ricevis leteron de Eŭropa amiko, kiu demandis: „Ĉu Amerikaj gejunuloj estas vere tiom ne-profundaj?” Supraĵa impresio povus jesigi tiun demandon: multnombra vizito de junuloj al malbonkvalitaj fi'moj, la granda nombro da junuloj disponantaj pri propraj aŭtomobiloj, la ĉiusemajna „adorego” de la piedpilkado kaj troakcentado de piedpilkado en lernejoj, la libermetoda (ne-puniganta) edukado de infanoj, knabinoj ŝminkigintaj ekde siaj 14-jaraĝoj, altiganta nombro da junulkrimuloj: ĉio ĉi ŝajnas riveli malaltan estimon de etikaj kaj spiritaĵvaloroj, kaj ne-profundajn karakterojn.

Tiu eksteraĵa bildo estas falsa. Je pli preciza rigardo, mi trovis miajn Amerikajn samaĝulojn konsiderinde pli maturaj ol Eŭropanoj. Ili estas pli amikemaj kaj neformalaj. Ilia scio pri politikaj problemoj kaj ŝtatcivitanaĵrajtoj kaj devoj surprizis min. La plej granda parto el ili ĝuas bonegan universitatan edukadon kiu estas pli speciala, porprofesia, reala kaj efika ol kutime, kaj kiu emfazas la valoron de nesciencaj aktivaĵoj. Pli ol duono de la studentaro laboras partotempe por financi la studadon. Mi trovis tiun junularon plena je kredo al glora estonteco, kiu donos al ili ĉion deziratan: ekonomian kaj profesian sukceson.

Sed kio do estas ilia vera koncepto?

Mi opinias ke ilia kredo en la „Amerika Viv-Maniero” (American Way of Living), viv-koncepto, estas malfacile priskribebla en kelkaj frazoj. Ĝi enhavas la principon de absoluta libereco de individua entre-



NE RESPONDECAS
T.E.J.O.

TEJO-MARŝO.

Dum la lastaj kongresoj niaj montriĝis, ke la „Junulara Marŝo”, kiun oni iam akceptis kiel la oficialan T.J.O.-kanton, estis preskaŭ nekonnata, kaj sekve de tio ankaŭ tute ne

estis kantata. Pristudante ĝin, mi rimarkas 2 gravajn malavantaĝojn, t.e. unue: la melodio ne estas originala: ĝi nome estas flandra marŝkanto de Karel Candaël; due: la teksto tute ne aludas nian organizon, sed ĝi povus esti la marŝkanto de ĉiu ajn junularuniigo.

Estas pro tio, ke mi de ĉi tiu loko alvokas ĉiujn membrojn verki specialan TEJO-marŝkanton, kiu plenumas la du suprenomita'n postulojn. Ni urĝe bezonas viglan marŝon, kiu dum niaj kunvenoj, naĉaj kaj internaciaj, sonu en salonoj kaj naturo, kiel signo de nia internacia kamaradeco TEJO-a. KaKa.

TUTMONDA EKSPOZICIO DE INFANDESEGNAĴOJ.

Dum la aŭtuno 1953 okazos en Stokholmo tutmonda ekspozicio de infan-desegnaĵoj. Aranĝonto estas Sveda Laborista Esperanto Asocio en kunlaboro kun granda, ĉiutaga gazeto, Aftontidningen.

La moto de la degsegnaĵoj estos: „Laboro kaj festo en mia hejmlandregiono”.

La desegnaĵoj povas esti koloraj aŭ blank-nigras.

Sur ĉiu desegnaĵo devas esti notita en nacia lingvo kaj en esperanto, la nomo de la lando kaj la titolo de la desegnaĵo. Krome estu notita la nomo kaj la aĝo de la desegninto.

Povas partopreni infanoj en aĝo ĝis 15 jaroj.

Ĉiu partoprenanto ricevos rekompencan.

Post la ekspoziciado en Stokholmo, ni provos cirkuligi la desegnaĵojn tra la tuta lando.

Estas tre grave el nia vidpunkto, ke tiu ekspozicio sukcesos. ĉar tiel ni havigos al nia organizo bonan reputacion. Ni nun petas kunhelpon de la esperantistoj en la tuta mondo, precipe ni turnas nin al la aĝinstruistoj, kun peto pri alsendo de desegnaĵoj, kiuj bone konformiĝas al la moto: „Laboro kaj festo en mia hejmlandregiono”. Helpu nin montri al la redakcio de la kunlaboranta gazeto, al la leŝantoj kaj al la vizitontoj, ke la esperantistoj vere kapablas fari praktikan, interpopolan laboron.

Sveda Laborista Esperanto Asocio.
Barnhusgatan 8. Stokholmo. Svedio

preno, paro'ado kaj kunveno; la konscion pri ekonomia supereco de Usono kaj konscion pri Eŭropa heredaĵo. En tiu ekonomia sistemo tekniko estas al'terade uzita por ĉiuj speciaj p'ibonigoj de la preskaŭ perfektaj vivkondiĉoj. Al tiu vivkon-

cepto apartenas ankaŭ la scio, ke tiu ĉi ideo'ogio troviĝas nuntempe en bata'lo kun alia ideo'ogio, la Marksismo. Kai tiu scio fortigas ĝin.

Aparte de tiu Amerika vivkoncepto, ĉiuj diferencoj preskaŭ foriĝas.

Michel Schmidt.

ORGANIZAJ INFORMOJ.

Sekr-ejo Lombokstr. 2, Leeuwarden (Ned.).

Ekspedado de „La Juna Vivo“: Al f-ino N. Kool ni esprimas nian koran dankon pro la laboro, kiun ŝi faris post ŝia ekŝigo de administrantino, nome la ekspedado de nia organo. Ĝin nun transprenis Koos Jonker, loganta en la tuja proksimeco de la kasisto kaj administranto. Ĉe stagnoj en la ricevado de L.J.V., vi turnu vin al la administració.

Artikoloj kaj recenzoj: La redakcio petas pardonon, ke diversaj ensenditaj artikoloj kaj recenzoj de la ricevitaj libroj ĝis nun ankoraŭ ne estas publikigitaj. Pripensu, ke nur 10 paĝoj staras je nia dispono! Tial ni ne povis ankaŭ la radio-programon represigi. La recenzoj, almenaŭ parte, aperos en la marta nro.

Ĉu vi jam sendis vian demandaron al via peranto? Se ne, faru tion nun!!

SCIIGOJ DE LA LIBRO-SERVO.

Adreso: Delft (Nederlando) Hof v. Delftlaan 79.

Ballantyne.	La Hundo Kruso	f	1,95
J. Grau Casas	Kataluna Antologio	f	6,—
	Burĝonoj (Infanfotaj kun teksto de Setälä)	f	8,60
Erkko.	Spegulo Homarana	f	0,50
	Maŝino, mono kaj mondpaco	f	1,30
Ferrière.	Kiel eduki niajn infanojn	f	0,85
Karalijčev.	La Ponto	f	0,15
Berger.	Niko kaj Nina	f	2,—
Setälä.	1, 2, 3 (por infanoj)	f	1,95
Makkink.	Esperanto leren lezen	f	1,—
Manders.	Vijf Kunsttalen	f	7,50
Zondervan.	Vortoj kaj Esprimoj	f	1,15
	Poŝvortareto	f	0,30
	Internacia kantaro „La Juna Vivo“	f	0,75
	Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo“	f	1,—
	Insigno (kun ŝraŭbeto)	f	0,75
Zamenhof.	Kongresaj paroladoj	f	0,70
Glück.	La grandaj filozofoj kaj la Universala Lingvo	f	0,35
—	El la klasika periodo	f	0,35
—	Paroladoj de la Ora Kongreso	f	0,35
Jung.	De Menuheddin ĝis Mundilatin	f	0,35
Scherer.	Tra Usono	f	0,35
Petöfi.	La Avo	f	0,35
	Rusaj Noveloj	f	0,35
De Bengoa.	La Jurnaskito	f	0,35
	La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912	f	0,35
Collinder.	La problemo de lingvo internacia	f	0,35
Thézard.	Nordnordaj fabeloj	f	0,35
Ŝirjaev.	En la vagono	f	0,35
Török.	Rozinjo	f	0,35
Dickens.	El la Londona Skizlibro	f	0,35
Dodge.	Flugado alimonden	f	0,35
Jorkov.	Patro kaj Filo	f	0,35



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Francujo: Esp. grupo (5 junulinoj) dez. kor. pri ĉiuj temoj kun grupoj en Grekujo, Jugoslavujo, Aŭstralio, Ĉehoslovakujo, Hindujo, Kanado. Skribu al F-ino Odette Arnaud, 11 rue de la Sablière, PONTARLIER (Doubs).

Germanujo: Dez. interŝ. p.m. (spec. Esp.) glumarkojn, ktp. ktp. ktp. Sro Alfred Neussner, Taubengasse 46, Franca Sektoro, Berlin-Lübars.

La „Verdaj Vagantoj” de la Esperanto-Junularo-Berlino (11-17 jaraĝaj) dez. kor. Skribu al Sro Max Mähler, Berlin-Wittenau, (1); Eisenpühstr. 55.

Hispanujo: Nia unua letervesp. okazos meze de majo. 20 geklubanoj (14-25 j.) atendas viajn let. kaj p.k. Esperanto-Grupo Moyá, Str. Forn no. 19, MOYA (Barna).

Nederlando: S-ino A. de Leeuw-Boon, Rijksstraatweg 33, Schoorldam N.H.) dez. kor. kun la tuta mondo.

Juna knabino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu multnombre al Jopie Sloten, Westeinde 257, Oosthuizen, Nederlando.

Nepre uzu la novan TEJO-korespondmaterialon por konigi nian organizon al viaj geamikoj!

LA KOREAJ ESPERANTISTOJ PETAS HELPON!

Profesoro de grava universitato, kie oni oficiale instruas Esperanton, informas nin pri absoluta manko de lernolibroj kaj materialo por legado. Ĉiu, kiu tion povas fari, estas petata sendi ĉiuspecajn esperantaĵojn al: Profesoro Hengwi Hongg, Chunggu Universitato, TAEGU (Koreio).

En restoracio.

- Mi volas pagil!
- Kion vi manĝis, sinjoro, ĉu bifstekon, aŭ kotleton?
- Mi ne scias, ĝi gustis kiel sapo.
- Nu, ĝi do estis kotleto, ĉar la bifsteko gustas kiel stearino.

Allan Mehtonen, Isokatu 67, Oulu, Finnlando.

Ĉu vi jam pagis vian kotizon por '52-'53?

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



DAŬRIGO DE LA AŬSTRALIAJ FABELOJ.

Rakonto pri la „JABIRU”.

„Jabiru” estas speco de cikonio, kiu vivas en Aŭstralio. Ĝi estas muta, sed havas ampleksan bekegon. Per tio ĝi kolektas fiŝojn, ranojn, ktp. el la marĉoj.

La indiĝenoj rakontas, ke la unua jabiruo estis klaĉulo. Ĝi klaĉis kiel maljunulino kaj neniel kapablis teni sekretojn. Iun tagon ĝi aŭskultis ceremonion de indiĝenaj ritoj. La ritan ceremonion povis partopreni nur viroj, ne virinoj. Sed la jabiruo rakontis ĉion al du virinoj. Baldaŭ ĉiuj virinoj de la tribo sciis pri la sekretaj ritoj.

La ĉagrenitaj viroj tuj ordonis, ke la tapiŝoserpento elŝiru la langon de la jabiruo. (La tapiŝoserpento havas tapiŝosimilan desegnon sur la haŭto, tial oni nomas ĝin tiel). La serpento ekfaris tion, sed tio ne plaĉis al la jabiruo. Ĝi kunkrampis siajn bek-duonojn sur la kapon de la serpento.

Tial havas la tapiŝoserpento platan kapon kaj estas la jabiruo muta.
ensendis Frank Halls.

Plezuriga sciigo.

Patrino: „Tiu bubeto certe estos aŭkcia vendisto, kiam li plenaĝiĝis.”

Patro: „Kial vi konjektas tion?”

Patrino: „Nu, rigardu, li ĝuste vian horloĝon havas sub martelo.”

Allan Mehtonen, Oulu, Finnlando.

La paketo.

En lernejo instruisto donis al Johano paketon por ke li ĝin dum la leciono portu al la stacio. Johano tre longtempe forestis kaj kiam li fine revenis, la instruisto kolere demandis, kie li estis tiom longe.

Johano respondis: „La paketo estis tiel fuŝe ligita, ke la ŝnuro sepefoje malligiĝis.”

Allan Mehtonen, Oulu, Finnlando.

Iom pri Aŭstralio.

Kapitano Phillip alvenis al Aŭstralio antaŭ 163 jaroj. Li fondis Sydney, kiu hodiaŭ estas la plej granda urbo de ĉi tiu kontinento. Nova-Suda Waleso, Viktorio, Queenslando, Suda Aŭstralio kaj Okcidenta Aŭstralio estis ĝis 1901a britaj kolonioj. Post tiu tempo ĝi estas nur sub protektado de Anglujo, sed ne plu estas ĝia kolonio. En la lastaj 50 jaroj Aŭstralio akceptis nur blankajn enmigrantojn kaj rifuzis enlasi ĉiujn neblankajn. Sur surfaco, kian havas Usono, vivas nur preskaŭ 8 milionoj da homoj.

Aŭstralio decidis pligrandigi la kvanton de la enloĝantoj kaj precipe post la dua mondmilito ĝi altiris Eŭropanojn. La unuaj alvenintoj estis enloĝintoj de la Baltaj ŝtatoj kaj poste multaj slavo el Orienta kaj Centra Eŭropo, la tiel nomitaj „dislokitaj personoj”. Ili alvenis el Germanujo, Aŭstrujo, Svislando kaj Italujo. De 1941a jaro alvenis $\frac{1}{2}$ miliono da dislokitaj personoj. Kiuj estis malriĉaj kaj ne povis pagi la vojaĝon, subskribis du-jarajn kontraktojn kaj devigis sin labori en tiu parto de Aŭstralio, kien ili estos sendataj.

Iam la enloĝantoj de Aŭstralio estis terkulturistoj, nun ili bredas ŝafojn, bovojn, ĉevalojn. La bonega lano „merino” estas ĉie en la mondo konata. La aŭstrialiaj komercistoj sendas la vivantajn bovojn kaj ĉevalojn al Anglujo per flugmaŝinoj.

En Aŭstralio ne estas malsufiĉeco de iu ajn produkto, mono aŭ laboro, tial la vivnivelo estas alta. La vivo estas agrabla kaj la tempo pasas rapide, kiel en la ĉevalkuroj, la plej ŝatata amuzado ĉi tie.

Por „La Juna Vivo” skribis
Bohuslav Kostinek,
Turramurra, Aŭstralio.
(Ĝi estas mallongigita kaj plisimpligita. Red.).

En nia sekvonta nro vi legos interesan rakonton pri la Bremenaj urbmuzikantoj.

Delikate.

Knabo (ekaperas ĉe la pordo de diversajvendejo): „Sinjoro Monero, via edzino vokas vin!”

Komercisto Monero: „Diru al ŝi, ke mi estas nun tre okupita, sed mi alvenos post dek minutoj. Kie ŝi estas? Ĉu en la ĝardeno?”

Knabo: „Ŝi falis en la riveron!”

Allan Mehtonen, Oulu, Finnlando.

La sekretario atendas ankaŭ v i a n nomon por helpi niajn amikojn en la nepagipovaj landoj.
